



Enorma Horloĝo

Chen Yu



En la pasintaj du jaroj, la industrio de horloĝoj troviĝis en malprospero. Pro tio, la Ruĝflaga Fabriko de Horloĝoj senescepte dronis en dilemo. Por eniri la internacian merkaton, ĝi komencis grandskale projekti novajn produktaĵojn. Fine, la fabriko elfaris automatan elektronikan enorman horlogon.

La enorma horloĝo estis instalita ĉe la supro de Huanghe-konstruaĵo en la centro de la urbo H. Ĝia horbata sono povis atingi ĉiun angulon de la urbo. Ne nur la popolanoj sin sentis fieraj, sed ankaŭ venis nemalmultaj vizitantoj el aliaj urbaj administracioj.

Vidinte, ke la horloĝego fariĝis granda allogo, la Ruĝflaga Fabriko kaptis la ŝancon por pliigi sian propagandadon. Tuj sekve, ĝi sendis invitilojn al diversaj lokoj de la tuta lando por okazigi novajan kaj samtempe varmandan kunvenon de siaj produktoj.

Estis neatendite, ke, je la tago tuj antaŭ la kunveno, kiam partoprenantoj fluis por sin anonci, la enorma horloĝo subite ĉesis labori. La riparisto, kiu estis sendita por kontroli la horloĝon, diris, ke okazis granda perturbo kaj oni bezonas unu aŭ du tagojn por ripari ĝin.

Ĉe tio, la fabriko estro maltrankviliĝis, ĉar unu grava ero de la morgaŭa kunveno estis pririgardi la horloĝegon!

Feliĉe, la fabriko direktoro havis saĝan kapon. Li flustris ion ĉe la orelo de la fabriko

estro, kaj tiu lasta fariĝis iom trankvila, dirante, “Do faru tiele. Trovu honestan kaj findindan ripariston. Tenu sekreton!”

Post kelkaj horoj, la horloĝego komencis iri refoje.

La anoj de la fabriko laŭdis, ke la horloĝego estas grandanima, alie ĝi detruos la kunvenon preparitan multe.

Tiutempe, Xu-er, la riparisto en la horloĝa ĉambro ĉe la supro de Huanghe-konstruaĵo ridis sekrete. Li diris, “Vi ĉiuj nenion scias. Ĉu ĝi povas iri? Estas mi, kiu ĝin helpas movi iom post iom! Ne riproĉu, ke mi trompas. La fabriko direktoro petis min fari tiele. Mi estas pagota 200 dolarojn por dutaga laboro.”

La novaĵa-varmenda kunveno okaziĝis je la planita tago.

Venis sufiĉe kelkcent ĵurnalistoj kaj klientoj. Kaj ankaŭ ĉeestis la gvidantoj de la urba registaro, kiu tre alte taksis la kunvenon.

Laŭ la tagordo de la kunveno, antaŭtagmeze okaziĝis la novaĵa kunveno en la hotelo. Posttagmeze je la tria, kelkcent vizitantoj venis antaŭ Huanghe-konstruaĵon, kaj la vicestro de la urbo diris al la ĉeestantaro, “Rigardu, amikoj, jen estas la unua horloĝego de nia provinco”

La ĉeestantoj levis siajn kapojn kaj nereteneble laŭdis pri la imponeco de la horloĝego.

Ĝuste en tiu tempo, la horloĝego ĉesis iri refoje. Ŝviteroj tuj ekaperis sur la vizaĝo de la fabrikestro. La direktoro pravigis, “Eble la cirkvito perturbiĝis. Mi supreniru por kontroli. Bonvole atendu momenton.”

En la horloĝa ĉambro, Xu-er ronke dormis. Okazis, ke tagmeze lia edzino sendis

manĝaĵon al li kaj li ĝoje drinkis multe da vino. Post foriro de lia edzino, li falis ebrie kaj endormiĝis.

La direktoro aliris kaj donis al li du piedfrapojn. Surprizite. Tiu tuj stariĝis kaj etendis sian brakon por movi la horloĝon. Denove ĝi fariĝis viva.

Malsuprenirinte, la direktoro ridete klarigis, “La splisaĵo malfiksiĝis. Post kiam mi streĉis ĝin, ĉio iras bone.” La ĉeestantoj kredis liajn vortojn.

Subite iu kriis, “Rigardu! Kial la horloĝa montrilo moviĝas inverse?”

La direktoro direktis sian rigardon al la horloĝo, jes, la montrilo moviĝis inverse! Enkore li blasfemis, “Ci sentaŭgulo...”, sed li elbuŝiĝis, “Mi kulpas, kulpas. Mi splisis malĝustajn dratojn.” Dirinte tion, li hasteme kuris supren. Kiam li malsupreniris, la horloĝego iris normale.

La fabrikestro pardonpetis foje refoje kaj ĉiuj respondis, ke tio estas nur makuleto en la blanka jado. Multaj klientoj faris mendojn de la produktoj.



esperantigis **Liu Jia**

EL **LAŬZI**



ĈAPITRO 53

(Ĉi tie Laŭzi satiras la siatempajn tenantojn de la regpotenco. Li atakas ilin pro ilia ekspluatado de la popolo, nomante ilin ĉefoj de rabistoj, kaj kondamnas iliajn agojn kiel kontraŭajn al la principo de la Taŭo.)

Se mi ekhavas iom da prudento,
Mi iros laŭ la granda vojo¹,
Kaj tiam mi timos nenion alian krom preni la
oblikvan vojon.
La granda vojo estas tre ebena,
Sed oni preferas la pli mallongan vojeton².
La palaco estas tre hela kaj luksa,
Dum la kampoj estas nekulturataj kaj
herbaĉokovritaj,
Kaj la grenejoj estas malplenaj kaj vakaj.
Tiu, kiuj sin vestas per elegantaj koloraj
vestoj,
Portas grandvalorajn akrajn glavojn,
Supersatigas sin per delikataj nutraĵoj kaj
trinkaĵoj,
Kaj posedas abundon da riĉaĵoj,
Ja povas esti nomataj ĉefoj de rabistoj.
Ho, kiel kontraŭa al la Taŭo tio estas!

¹ La granda vojo metafore aludas la Taŭon.

² La mallonga vojeto metafore aludas ĉian doktrinon nekonforman al la Taŭo.

ĈAPITRO 54

(Tiu ĉi ĉapitro estas pri la avantaĝo, kiun alportas al la homoj la plivastigo de la apliko de la principo de la Taŭo. Li deziras, ke la principo estu aplikata en la najbaraĵo, en la regno kaj eĉ en la tuta mondo.)

Tio, kio estas bone starigita, ne ŝanceliĝas;
Tio, kio estas firme tenata, ne elglitas;
Kaj tiel la oferado al la prapatroj daŭros
seninterrompe de generacio al generacio.
Apliku la principon al vi mem, kaj via Virto
estos vera;
Apliku ĝin al via familio, kaj via Virto estos
pli ol sufiĉa;
Apliku ĝin al via najbararo, kaj via Virto estos
honorata;
Apliku ĝin al via regno, kaj via Virto estos tre

abunda;
 Apliku ĝin al la tuta mondo, kaj via Virto estos
 universala.
 Tial ni devas juĝi personon laŭ lia Virto,
 Juĝi familion laŭ ĝia Virto,
 Juĝi najbararon laŭ ĝia Virto,
 Juĝi regnon laŭ ĝia Virto,
 Juĝi la mondon laŭ ĝia Virto.
 Kiel do mi konas la staton de la homa mondo?
 Per la metodo supredirita.



elĉinigis **Wang Chongfang**

Modernaj Poemoj

Lingvo de Ŝtono

Xi 'Di

milfoje mi imitas min mem
 imitas mian korpon
 mi staras en okuloj miaj
 tiele frosta
 tiele fremda
 ne sciante kiu estas kiu
 per mia propra vip' mi frapas
 post kiam mi foriris diste jam de mi mem
 mi trovas, ke mi estas peco da malmola
 ŝtono

pro kaŭz' okaza
 ripozis iu sur la ŝtono
 kaj ĝin forlasis
 mi restis mi mem
 kaj blanka kaj maljuna

al la gloro aranĝita de vi
 neniam mi inklinas
 piedoj miaj radikigiĝas en la sino de la

Ter-Patrin' ankoraŭ
 mi estas nek malbela nek ĉarmeta
 mi faras nek malbonon nek bonecon
 antaŭ ol la tempo min forvoros
 atendas mi kun tuta koro
 ke la plej juna aŭ la plej maljuna ŝtono
 adventu ĉi sezonon

manprenos kun li
 mi interŝanĝos lingvon kaj gestadon
 post tio, fronte de la tombo
 mi diros adiaŭon al li



elĉinigis **Ma Fei**

La Vintra Nokto de l' Centjara Fino

Zhang 'Fengxia

je l' vintra nokto de l' centjara fino
 ni faris fajron per borad' de lingvo
 sidante ni atendis la miljaron
 kun fajrolumo en la koro
 ja la miljaro estas amnestia
 de ni sopirata ĉio eblas realiĝi
 ŝokad', vekiĝo, konsciiĝo
 sub la lumo de l' miljaro disŝutata vaste
 naskiĝos nova ĝermo
 bebo kun animo tute nova kaj
 temp-nostalgio



se ni libroforme
 l' antaŭvesperon de miljaro ŝlosos

